

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

Verše v esperantu

O pomocném mezinárodním jazyku myslili někteří a dosud myslí ti, již jsou informováni povrchně, že jeho úkolem je dorozumění jen o věcech konkrétních a o vztazích jednoduchých. Z toho omylu vychází také autor Basic English domnívaje se, že angličtina mohla by se státi pomocným jazykem, kdyby se z ní vybrala nejčastější slova (určil jich 850) a ostatní představy a vztahy by se vyjadřovaly opisy. Zkušenost ukázala nesprávnost této domněnky. K nouzovému dorozumění dostačí nepatrná znalost cizího jazyka a gestikulace. Ale lidé právě potřebují jazyk, jenž vyjadřuje představy a vztahy všechny a přes to je lehce k naučení. To je právě od počátku cílem esperanta. V tom je jádro problému.

Snad proto Zamenhof hned od počátku pokoušel se i o básně a to s úspěchem stejně pozoruhodným jako dojemným. A je symptomatické, že už prvá česká učebnice esperanta od Fr. V. Lorenze, tři leta po publikaci esperanta, má autorův překlad hymny Kde domov můj. A rozvoj esperantské literatury je vytrvale provázen rozvojem esperantského básnění.

Jednalo se v první řadě o překlady, jež musily nápodobiti rytmy, rýmy a básnické ozdoby jazyků evropských. Nebyl to pro umělý jazyk úkol lehký. Řeč básnická se liší od řeči sdělovací náladovostí svých slov, jež vzniká jednak jejich zvukem a jednak jejich smyslem. Obě však v nás vyvolává tlum představ sdružených s jejich zvukem i smyslem složitými zvyklostmi asociálními. Vzpomeňme jen na složitost nálady, již vyvolává text a melodie národní písně přes nebo právě pro její častou nelogičnost. Básník přetváří řeč, dává je běžným slovům nový vztah, dává jim nový odstín, nebo raže si výraz vlastní. Převést to do esperanta je úkolem překladatele. Vedle toho má předati esperantskému čtenáři i vnější tvar básně, to jest její rytmus, rým a ostatní ozdoby a tropy.

Rytmus řeči je více méně pravidelné střídání silných a slabých zvuků. Jejich síla se posuzuje buď podle přízvuku (prosodie přízvučná) nebo podle délky slabik (prosodie časoměrná). Řecké a latinské básně byly psány podle časoměry, básně v jazycích románských, germánských a slovanských jsou psány podle prosodie přízvučné. Také v esperantu od počátku psaly se verše podle přízvuku.

Hlavní stopy (piedoĵ) užívané ve verších jsou (— znamená přízvučnou slabiku, ○ nepřízvuč.):

Trochej (trokeo) — ○

Jamb (jambo) ○ —

Amfibrak (amfibrako) ○ — ○

Daktyl (daktilo) — ○ ○

Anapest (anapesto) ○ ○ —

Prvé dvě stopy jsou dvojdobé (dutempaj), ostatní tři trojdobé (tritempaj).

Svaz esperantistů Československé republiky
zve na svůj

ŘÁDNÝ SJEZD

v Praze dne 17. a 18. dubna 1948

s tímto pořadem:

V sobotu 17. dubna ve 20 hodin v klubovně kavárny »Louvre« v Praze II., Národní 20

Přátelská beseda,

na níž zahájí diskusí Dr. Stanislav Kamarýt přednáškou: Aktualaj problemoj.

V neděli 18. dubna v 9 hodin dopol. v sále kavárny »Louvre« v Praze II., Národní 20

Sjezdové jednání.

1. Zápis o posledním sjezdu.
2. Zpráva o činnosti.
3. Zpráva pokladní.
4. Zpráva revisorů.
5. O změně stanov.
6. Doplňovací volby do ústředního výboru.
7. Volné návrhy.

Zpráva o činnosti bude uveřejněna v příštím čísle. Proto nebude třeba zprávy čisti, nýbrž o nich hned jednati. Prosíme všechny své členy, aby zprávě věnovali pozornost, již si zaslouží. Jmenovitě prosíme všechny své místní odbory, aby vyslaly na sjezd své zástupce, a aby nám poslaly do 11. dubna své podněty k jednání.

Ústřední výbor.

Přirozený rytmus jazyka je dán vzájemným poměrem slovníkových stop (leksikonaj piedoj). Každé slovo samo o sobě může být uvažováno jako stopa. »Vyšel, seno, víno, dobrý« jsou české trocheje, »vyletěl, pohádka, zazpíval, na cestu« jsou daktyly, neboť v češtině je přízvučná vždy prvá slabika a jednoslabičná předložka se přízvukem spojuje s následujícím substantivem. Vedlejší přízvuk mají pro potřeby prosodické ostatní liché slabiky, jež mohou být přízvučné i nepřízvučné. Také jednoslabičná slova jsou přízvučná nebo nepřízvučná.

V esperantu je přízvuk na předposlední slabice. Dvojslabičná slova jsou tedy také trocheje: patro, akvo, vino, bona, kantí. Ale slova trojslabičná jsou amfibrazy (O — O): patrino, invadí, kroniko, kruela. Není slovníkových daktylů ani jambů, stejně jako v češtině není slovníkových jambů a amfibraků.

Slova s přízvukem na poslední slabice mají přízvuk »mužský« (oksitona), s poslední slabikou nepřízvučnou »ženský« (paroksitona). V češtině se pro potřeby veršové pokládají za oxytona slova jednoslabičná, na nichž je větný přízvuk a slova lichoslabičná pro vedlejší přízvuk lichých slabik (na př. stál, sál, domluvil, povídal). Pravá oxytona jsou na př. angl. relief, franc. matin, něm. Beruf, ital. citta.

V esperantu jednoslabičná slova nemají sama sebou přízvuk, získávají jej jen svým významem ve větě. Na př. **jes, nun, ve, ho** budou mítí přízvuk vždy, **kaj, de, al, la** nikdy, **ne**, podle významu, jež právě má. Ve verších získávají přízvuk podle potřeb rytmických, ovšem v dobré básni nesmí býtí rytmus v rozporu se smyslem verše a významem slova. U složených slov je také jen jeden přízvuk, zaniká přízvuk u složky méně významné. Na př. vaporŝipo a maŝinskribi jsou »por« a »ŝin« nepřízvučné. Dvě přízvučné slabiky nemohou následovat za sebou v jednom slově. Protože esperantská slova nemohou býtí oxytona, užívá se v jazyce básnickém elise (elizio), výpustky substantivní koncovky —o a označuje se to apostrofem.

Enklitiko jmenuje se v esperantu slovo, které má jen slabý přízvuk, jenž může za určitých okolností zaniknouti. Jsou to: 1. slova v tabulce (neurčitá, hromadná, tázací, ukazovací zájmena). 2. Přivlastňovací zájmena (mia, cia, lia, ŝia, ĝia, sia, nia, via). 3. Slova dua, tria, apud, preter, super, ili, oni, unu, estas. Souhrně: všechna dvojslabičná slova, jejichž přízvučná samohláska je krátká, často i nevýrazná pro vnitřní hiát, a která pro svou malou významnost nemůže se vyslovovatí silně.

Přirozený rytmus jazyků je velmi různý. Lze ho porovnávatí podle procentového poměru slovníkových stop v jednotlivých jazycích. Následující tabulka je vzata z Parnasa gvidlibro a doplněna vlastním měřením pro češtinu, jež jsem provedl propočítáním stránek z Karla Čapka, Vladimíra Neffa, Jaroslava Stránskébo, Marie Pujmanové. Angličtina není v prvé tabulce, protože velký počet jejich jednoslabičných slov by zkresloval obraz. Udává procenta v uvedených jazycích.

Stopy	Esp-o.	Cešt.	Pol.	Franc.	Něm.	Ital.	
Jamby ○ —	0	0	0	40	12	8	%
Anapesty ○ ○ —	0	0	0	30	2	3	%
Amfibrazy ○ — ○	31	0	37	12	22	22	%
Trocheje — ○	69	60	63	18	53	61	%
Daktyly — ○ ○	0	40	0	0	11	5	%

Druhá tabulka ukazuje procentové složení jazyků v celku, tedy všech slov, když v prvé tabulce jsou počítána jen slova dvoj- a trojslabičná. V této jsou počítána také jen slova z prózy, ale tak, že se počítají metrické celky, tedy ne každé samotné slovo, nýbrž jako jednotka se bere slovo se slůvky bez samotného přízvuku, jež se k němu přízvučně přikloňují (v češtině jednopísmenné a jednoslabičné předložky se substantivem nebo adjektivem, v němčině, angličtině atd. členy, předložky a pod.:

Délka slov	Esp-o.	Cešt.	Pol.	Franc.	Něm.	Ital.	Angl.	
1—2 slabiky	33	61	50	22	66	28	62	%
3 slabiky	37	25	31	34	25	34	31	%
4—7 slabik	30	14	19	44	9	38	7	%

Tyto tabulky ukazují názorně rytmickou rozmanitost řečí. A je dokladem znamenitosti esperanta, že dovedlo prostředky, jež si samo vytvořilo, převáděti básně ze všech jazyků, a to často velice adekvátně. Od prostých veršů Zamenhofových a Grabovského dospělo k Eterna bukedo Kalocsayovu a spěje zřejmě dál. Vidíme pokusy jednak vytvořiti metriku vlastní, jednak napodobiti metriku jazyků východních. Jsou výborné překlady skoro ze všech klasiků. Překládá se však s úspěchem též Verlaine, Burns a jiní mistři básnického slova. My jsme se pokusili přeložiti verše z Viktora Dyka, Sovy, K. Tomana, Vítězslava Nezvala.

K tomu všemu bylo třeba rozšiřovati slovník. Normalisovati tento přirozený postup pokusili se právě K. Kalocsay (Maďar) a G. Waringhien (Francouz) už vzpomenutou knihou Parnasa gvidlibro, jejíž plný titul v českém překladě zní: Jak se státi básníkem neboli průvodce na Parnas. K. Kalocsay-G. Waringhien. Vydal Literatura mondo, Budapest, 1932. Pokládám za jeden z největších úspěchů esperanta, že tento zárok se podařil, že esperanto obohaceno o »odborný« slovník pro poesii neztratilo nic ze své logické struktury ani ze své snadnosti. Také technika rýmů se vyvinula, jsou odmítnuty rýmy koncovkové (adasismoj). O tom podrobně pojednala studie dra T. Pumpra v Ligilu 1939. A v esperantských verších je stále více poesie.

Je pro nás druh zadostiučinění, můžeme-li mezi esperantskými básníky jmenovati i Čechy: Stanislav Schulhof. Miloš Lukáš, Tomáš Pumpr, Rudolf Hromada, Karel Pič a pseudonymy Vočo a Erinazzo.

Ale cíl tohoto článku není historický přehled nýbrž polemika. Tato všechna fakta totiž vyvracejí theorii Basic English, podle níž by se mohl pomocným jazykem státi »zjednodušený« živý jazyk, který by se vědomě omezoval na vyjadřování vztahů jednodušších nebo zjednodušovaných jejich zaznamenáním. Neboť je třeba pra-

vého opaku: nástroje, který postihne složitost moderních situací právě v celé její pluralitě a který ji adekvátně vyjádří. O to usiluje jediné esperanto a jediné esperanto je toho schopno, protože není vytvořeno abstrakcí, nýbrž stále se dotvořuje novými situacemi, do nichž bez přestání vniká. Zdokonaluje se tím, že roste úkoly, jež musí denně zmáhati.

Tento článek chtěl být též chválou poesie. Proto také věnujeme v tomto čísle více místa veršům než obvykle. Ale článek není návodem k děláni veršů. K nim je třeba asi milostí boží.

Parnasa gvidlibro je uvedena »baladou vychvalující užitečnost této knihy«, jejíž každá strofa končí výstrahou

Mi ĉion donas krom genio.

Což zní česky při zachování metra (amfibrak, tři trocheje nebo čtyři a půl jambu)

○—○/—○/—○/—○/

Dám vše ti vyjma jiskru boží.

Dr. Stan. Kamarýt.

ANTONIN KLÁŠTERSKÝ:

BOTELO

(Fantaziaĵo)

Maljuna kolumbia fiŝkaptisto
John Milter, en boato revenante
de vasta maro al la bordo hejma,
ekvidis per okuloj la aglecaj
en malproksimo naĝi malhelajon,
kaj ĝi, dum ĝin prezentis ond' al ondo,
briletis jen kaj jen. Li ĉasdirektis
la barkon tuj al la makulo stranga,
ĝis persekute kaptis li — botelon.
Migrinta certe estis ĝi jam longe
tra l'oceano laŭ aspekto sia,
kaj la fiŝisto flustre ekblasfemis:
ĝi estis ja botelo nur malplena,
vitraĉo, dum lin ujo da viskio
pacigi povis. Kiu ĝin forĵetis?
Li estus ĝin al ondoj redoninta,
ĉar li ekbolis, sed vidante poste,
ke ĝi tre firme ŝtopfermita estas,
kapneis li, ĝin metis sur la fondon
de sia barko. Post la albordego
la gorĝon de l'botelo li trakasis
kaj kun mirego prenis el interne
paperan strion. Kaj li pene legis:
„La ŝipon Sea-maid trafis ŝtormo forta
sur vasta maro, kaj por ni ekzistas
nenia savo plu, torentas akvo
sur nin, jam baldaŭ ĉiuj ni mergiĝos.
Saluton lastan portas ĉi-botelo
kaj komunikon, kiu ne pereu,
ke trovis ni [jen sekvis latitudo...]
insulon belan, novan kaj senhoman.“
John Milter legis, legis li refoje
[jen ankaŭ nomo de l'ŝipestro sekvis],
kvazaŭ post sonĝo frotis li okulojn.
Ho, scias dio, kiom da ideoj
maljunan kapon lian nun traflugis.
Terpeco nova! Kaj pri ĝi li sola,
nur sola scias! Ĉu diskreti ĉion,
sur la insulon kun la siaj iri,
okupi ĝin kaj ĝin deklari sia?
Vizio loga lian menson kaptis,
kiel li reĝas sur insulo riĉa,
kiel li ĉasas, vagas tra arbaroj,
sur feloj kuŝas kaj viskion trinkas,

ordonas, regas. Mem li ekridetis
pri tiuj revoj; li ekpensis poste,
ke devas li informi la estraron,
por gajni rekompenco — tamen plue
hezitis li, ĉar la informo stranga
lin meditigis, dum li sidis sola
sur roko antaŭ la muĝanta maro:
Al la insulo ŝip' ekiros certe,
por ĝin okupi; nu, kaj kio sekvos?
Alia regno, ankaŭ ter-avida,
uzurpi volos la kaptajon karan
kaj ekmilitos. Sange koloriĝos
la maraj ondoj, sangruĝiĝos ploro
okulojn de patrinoj malfeliĉaj.
Kaj dume svarmatakos la insulon
aventuristoj oron soifantaj.
Faligos ili la arbarojn, kiuj
ĝis nun sin levis en trankvilo sankta,
kaj ili komercaĉos, serĉos, rabos,
sin trompos, batos, murdos reciproke.
Ho, estu vere, ke sur la insulo
ne vivas homoj, ĉar aliokaze
ve, ve al ili! Aŭdas mi katenojn
sur manoj de l'obstinaj sovaĝuloj,
plantejojn vidas mi jam etendiĝi,
sub batoj de bastonoj kaj de vipoj
ĝemkrioj sonas kaj fluadas ŝvito
en oron ŝanĝiĝonta. Ne eklloros
feliĉo tie, nur dolor', malĝojo
kaj pesto kaj mizer', malsato, murdoj,
teruro kaj sklaveco kaj sufero
de l' tuta mondo tien transportiĝos.
Ĉu vere? Tio ja de mi dependas! —
ekridis la fiŝisto sulkolrunta
kaj la paperon li dispecetigis;
kvazaŭ momenton tiun atendinte,
ekblovis de la maro forta vento,
la striojn prenis sur flugilojn siajn,
tiel ke ili papilie svarmis,
kaj super mar' ĝi ilin lasis. Fikse
postrigardinte ilin, la fiŝisto
la botelpecojn piedpuŝis maren.

Tradukis Miloš Lukáš.

EL VESPERAJ KANTOJ DE HÁLEK

Kanto LI.

Per oraj kordoj kiu ludas,
estimu tiun pli ol vin,
ĉar dio tian montris amon,
ke el ĉielo sendis lin.

Terure, se per rikoltmanko
kaj per la pesto punas di';
sed la plej granda puno estas,
se mankas kanto en naci'.

Kaj ne pereas la nacio,
se kantas al ĝi la poet',
kaj kant', naskita en ĉielo,
por morto estas viv-rimed'.

Tradukis Adolf Staňura.

AMARA RERIGARDO

Mi belajn versojn forĝis;
jen mi mensogis, jen la veron diris;
ofte mi vortojn sorĉis;
ofte mi pene la vivĉaron tiris.

Nenion mi tro amis
per mia koro laca kaj skeptika;
ofte mi verve flamis;
ofte mi cedis kun ridet' cinika;

nenion mi tro alte
taksis ĉi tie en ĉi tiu mondo,
kaj tute senekzalte
mi paŝis preter ĉiu horizonto.

Tamen mi ŝatis ion:
horloĝon, kiu ĉiuhore sonis;
kaj junan sinjorinon
kiun, leganto kara, vi ne konis.

POŝPOEMO

Junago estas
ĉagren'
kaj ora ŝtono.
Ŝi sin malvestas
sen ĝen'
en pavilono.

Gitaro ploras.
Gitar'
estas tentilo.
Mi vin adoras,
Korsar',
mia jarmilo!

ORDINARAJ TAGOJ

Ĉiu tago estas ovo!

Ho, disbatu ĝin!
Ene, laŭ la sortbontrovo,
atendados vin
miliono,
aŭ malbono,
aŭ vojaĝo al Bostono,
aŭ eĉ Georgin'...

Ĉio estas sorĉa ovo
jam krevonta post la kovo...
Ho, Kolumbo, rompu ĝin!

SUR VOJKRUCO

Mi rememoras, kiel timoplene
vi foje tuŝis mian vivovoĵon:
Samkiel meteor' vi venis treme
kaj vekis en la kor' tajreran ĝojon,
kiu minacis ĉion gluti prene.

Vi malavare disdonadis senton;
manĝeme pendis mi ĉe viaj lipoj,
ni timis nek sunbrilon, nek pluvventon,
ĉar ja nenio kaj nenies vipoj
kapablis skui nian firmamenton.

Sed venis kriz'! Feliĉon elserĉante
subite vojon perdis ni ĉe vojokruco:
la voj' maldekstre promesadis vante
amikajn sentojn, brue kaj kun ruzo;
la dekstra amon proponadis kante.

Ĉu amikec'? Ĉu amo? Jen dilemo!
Sur kiu voj' ni nian celon ĉasos?
Maldekstren vin, min dekstren mia emo
gvidos; post mia kor' mi blinde paŝos...
Kaj tial, ve: Neniam ĝis reveno!

Adiaŭ, mia amo!

El ĉefa manuskripto
tradukis Karolo Píč.

BRULIS LA TILIO

Ho, brulis, brulis la tilí,
tajreroj flugis ĉirkaŭ ĝi,
sub arbo sidis virgulin',
junuloj tre bedaŭris ŝin.

Ne ploru, ne bedaŭru min,
ne sola estas mi knabin',
abundas ĉie apud vi
knabinoj, kiel estis mi.

(Tiu ĉi kanto estas unu el la plej antikvaj ĉeĥaj kantoj, konservita ankoraŭ el la antaŭkristanaj tempoj, kiam la ĉeĥoj siajn mortintojn ne entombigadis en la teron, sed bruligis ilin sur lignoŝtiparo. La tilio estas, kiel sciante, la plej ŝatata arbo ĉe la Slavoj ĝenerale.) Erinazzo.

El la „Kantoj de la sklavo“ de Svatopluk Ĉeĥ

KANTO V.

Ni estas mildaj, obeemaj sklavoj,
sen timo ĉiu povas bati nin,
ni ne posedas, kion gajnis avoj,
nek la honoron — ĉiu rabas ĝin...
Vipataj kiel brut' en jugo firma,
pro fremda bono kaj plezur' —

Horo de la sklavoj:

Ni estas senrajta brutaro sensirma,
ni — sklavoj nur!

Sinjoro diras: Nur laboru, ŝvitu,
nur plugu, semu kaj rikoltu vi
pro mia gajno, ke nur mi profitu,
kaj kun amikoj ke diboĉu mi —
katenon novan por vi mi farigos
kaj novan skurĝon, jes!

Horo de la sklavoj:

Mallaŭd' eterna nin lacigas
kaj mok' sen ĉes'!

Nenion ni posedas, nur sinjoro,
por li sur kampoj fluas nia ŝvit',
krom lia pro ni ne ekzistas volo,
ĉar leĝo, rajto — laŭ lia decid'.
Mensogo pravas kontraŭ nia vero,
eĉ dio mem' ne povas helpi nin —

Horo de la sklavoj:

Ni, sklava grego, vivas en mizero
sen lim' kaj fin'.

El la ĉefa Erinazzo.

Brazila verkisto pri Ĉeĥoslovakio

S. A. Oliveira, notario en la urbo Tanabi en ŝtato Sao Paulo, estas brazila verkisto, kiu publikigas artikolojn kaj librojn pri filologio, folkloro, historio kaj geografio. La plej grava estas lia enciklopedieto (219 paĝoj 12×18 cm) de popolaj parollitroj kaj slangesprimoj el ŝtatoj São Paulo, Minas Gerais kaj Mato-Grosso „Expressões do Populário Sertanejo“, aperinta en 1940. Lia intereso pri Esperanto turnis lian atenton al nia respubliko jam post la unua mondmilito. Li korespondis precipe kun sinjoro Jaroslav Miller en Praha. Korespondante kun ĉeĥoslovakoj li kolektis diversan materialon, kiun li uzadas pro vekoj en Brazilo intereson pri ni. De s-ro Jaroslav Miller ni ricevis sekvantan artikolon, kiun ni publikigas ĝojante pri amiko, kiu scias ĝuste kompreni la faktojn. La aŭtoro estu de ni salutata per amika manpremo.

Ĉeĥoslovakio, situata en koro de Eŭropo, tuŝas per siaj limoj Germanion, Pollandon, Sovetunion, Hungarion, Aŭstrion. Ĝi estas lando, kiu jam delonge altiras mian koron.

Antaŭ la dua mondmilito mi havis en tiu ĉi lando diversajn esperantistajn korespondantojn. Leterojn, poŝtkartojn, librojn, artobjektojn, kiuj

kolektiĝis ĉe mi el tiu korespondado, mi konservas kiel sanktajn relikvojn rememorigantajn pri la karaj samideanoj el Masaryk-lando.

Kiam eksplodis la lasta milito en 1939, mia koro ekstremis. Tro potenca boto naziista stariĝis sur Bohemio, Moravio kaj Slovakio. Lidice kaj aliaj civitoj estis detruitaj. Ĉesis ĉiuj informoj el la belaj landoj, tuŝataj de akvoj de Elbo kaj Danubo. Nur post fino de la milito mi povas renovigi interrilatojn kun geamikoj el Ĉeĥoslovakujo, precipe kun Jaroslav Miller, de kiu mi ricevis mapojn, revuojn, librojn, bildojn pri la ĉefurbo Praha, nomebla sen troigado unu el la plej belaj mondurboj.

Sole Esperanto povis efektiviĝi tiun miraklon: alproksimiĝi min kun tiu heroa popolo tiom intime kaj senpere spite diversecon inter la lingvoj. Estas nia devo ĉiam danke rememori Doktoron Zamenhof, kies ideo ebligis tion. Kaj mi sendas de tie ĉi, el regionoj sudamerikaj, amikajn salutojn al la noblanima popolo de Ĉeĥoslovakio, kiu dum multaj jarcentoj konstruas sian patrujon.

KRONIKO ENLANDA

Peto pri aŭdienco ĉe sinjoro prezidento. Laŭ decido de nia kongreso ni petis en januaro pri aŭdienco ĉe sinjoro prezidento de la respubliko volante danki lin pro lia saluto al la Berna kongreso. Al la letero ni aldonis presitan memorandon verkitan de Th. Kilian. Nia peto ne povis esti plenumita. La responda letéro tekstas en esperanta traduko:

»Kabineto de la Prezidento de la Respubliko. N-ro 100101/40. En Praha la 26-an de januaro 1948. Al Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko en Praha XIX, Uralské nám. 9.


Kabineto de la prezidento de la Respubliko konfirmas ricevon de Via letero kaj de memorando aldonita, kiujn Vi sendis al sinjoro prezidento, petante samtempe, ke sinjoro prezidento akceptu Vian delegitaron en aŭdienco. La subskribita kabineto prezentis Viajn leteron kaj memorandon al sinjoro prezidento, kiu ilin tralegis kun tiu intereso, kian li ĉiam havas pri Via laboro kaj ĝiaj rezultoj.

Laŭ lia ordono ni dankas Vin elkore kaj samtempe ni petas, ke Vi en afero de petata aŭdienco sinjoron prezidenton pro troa laborado de tutŝtata signifo afable senkulpigu.

Por kabineto Dr. Matouš.«

Dua disaŭdigo de Esperantista Arto-programo el Praha la 2-an de februaro estis sub devizo: Amika kunesto kun niaj aŭskultantoj. Venis pli ol cent leteroj responde al la unua disaŭdigo. Estis citataj skribintoj aŭ diversaj partoj de la leteroj kaj oni respondadis jen per versoj de ĉefaj poetoj, jen per muziko, jen per prozo de radioaŭtoroj. Ni citu precipe deklamon de versoj el Machar (Seka psalmo) kaj el Vrchlický kaj ni laŭdu pro tiu ĉi vespero precipe la reĝisoron Bezdíček. La sinsekvo de versoj, muziko, prozo,

komento, kanto estis tre impresa kaj post duonhora aŭskultado certe neniu estis laca pro enuo. La tria programo estos disaŭdigata la 1-a de marto je la 23,00—23,30 per Praha II kaj Morava.



Theodor Ĉejka en familia rondo (13. VIII. 1944).

Al artikolo de Georges Agricola: Luzacia popolo, aperinta en »Esperanto« en majo 1947 (vidu nian paĝon 56 de tiu jaro) donis al sinjoro Bruno Gahler, estinta Ĉeĥoslovakiano, komitatano de Germana Esperanto-Ligo kaj redaktoro de ĝia »Informilo«, stimulon skribi al s-o Agricola leteron, asertatan, ke li mensogis »laŭ la konata ĉeĥa maniero«. La luzaciaj serboj ja povis en Germanio promeni en siaj naciaj kostumoj, sed ĉeĥoj en la respubliko malpermesadis al germanoj vojaĝadi en iliaj naciaj kostumoj tra ĉeĥaj regionoj. La aŭtoro respondis al sinjoro Gahler refutante liajn asertojn kaj akcentante precipe la faktojn, ke la luzaciaj serboj estis germanizitaj kaj ke Hitler tute malkaŝe deklaris la sorton, preparatan por slavoj en la germana grandimperio. La ambaŭ tre instruaj leteroj kun tre bonaj klarigoj estas publikigitaj de s-o Jindřich Černý en tagjurnalo Stráž severu el 11. II. 1948 sub titolo »Luzacio — afero de homara rajto«. La redakcio akceptu dankon pro publikigo de tiu ĉi bona artikolo kaj ĝia verkinto la gratulon.

En kunveno de Centra asocio por fremdultrafiko (Ústřední svaz pro cizinecký ruch) en Praha la 30-an de januaro parolis pri signifo de Esperanto por fremdultrafiko s-o Václav Špūr, reprezentanta Lokan Komitaton por fremdultrafiko en Doksy. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 oficialaj delegitoj.

Ĉeĥa biografio de Zamenhof. La granda eldonejo Orbis en Praha XII, Stalinstrato 46, aperigas serion de mallongaj biografioj de renomitaj homoj en tre bela unuforma aranĝo kun la titolo »Kiu estas — « sub redakto de Jarmila Kroftová. La kolekto aperas en granda eldonkvanto tre plaĉe presita. Kiel ĝia 89-a numero aperis. »Kiu estas L. L. Zamenhof«. Verkis Julie Šupichová. (L. L. Zamenhof. Napsala Julie Šupichová. »Kdo je«, ĉ. 89. Vydává Orbis, Praha, 1947. 40 paĝoj, 13×18 cm.) La vivo de Zamenhof estas rakonta-

ta per simpla kaj akveklara stilo, kiu impresas la leganton tre profunde. Oni sentas la sindediĉon de la aŭtorino al estimo de la Majstro. La vivo de Esperanto-kreinto ne povas esti rakontata sen aludoj pri sorto de lia verko tiom intime kunligita kun ĉiuj liaj pensoj kaj celadoj. Tial estas tiu biografio ankaŭ mallonga historio de nia lingvo el ĝia plej unua epoko. En la ĉapitro titolita »Kun helpo de ĉiuj« estas impreso priskribita Zamenhofs klopodo komenci movadon, kiu ebligis kreon de intereklezia religio (li nomigis ĝin hilelismo laŭ profeto Hillel). Kortuŝa estas rakontado pri la morto de la Majstro dum la unua mondmilito, tri monatojn poste, kiam estis lin vizitinta Dr. Edmond Privat el Svislando. La edziĝo kaj geedza vivo de Zamenhof estas kortuŝaj, ĉar ili pruvas la sindediĉon de lia edzino Klara al idealo de sia edzo kaj jam supraĵa kono de tiu geedza vivo vidigas, kiom da ofereco kaj amo enestis en la koro de tiu edzino. Šupichová scias pri ĉiuj tiaj cirkonstancoj rakonti kvazaŭ ŝi kantus pri temo amata. La aŭtorino akceptu dankon de esperantistoj pro bone plenumita laboro. — La belaspekta broŝuro kostas 6 Kĉs.

Ho, nova perlo de l'kolekto „Kdo je“,
vi okdeknaŭa ĉarma volumet',
vi min inspiras ja por ĉi sonet';
mi ĝoje kaptis vin, vin legis ĝoje

kaj baldaŭ certe legos vin refoje ...
vi longe ne ripozos sur la' bret':
Dekfoje legos vin la filinet'
kaj la edzin' vin legos dudekfoje.

La aŭtorinon de la verko nova,
la karan koleginon Šupichová,
sincere laŭdu simpla mia strof',

ĉar elokvente kaj kun sento pia
al ni priskribas lerta plumo ŝia
la vivon de la Majstro Zamenhof!

11. 2. 1948.

Miloš Lukáš.

UNUA LABORKUNSIDO DE ASOCIO (Fino.)

Vortaro. Granda vortaro esperanta-ĉeĥa de prof. Filip aperos en 1948. — Eldoni grandan vortaron ĉeĥa-esperantan por 260.000 Kĉs Asocio ne povas. Ĝi provizore solvas la problemon per eldonado de mezgranda vortaro ĉeĥa-esperanta de Hromada, 160 paĝoj. La membroj ĝin ricevos por 15 Kĉs, se ili aliĝos ĝis fino de februaro. La novaj membroj por 20 Kĉs. Raška (Ostrava) opinias: Se ĉiu membro pruntus 200 Kĉs, eble la sumo 260.000 Kĉs kolektiĝus. Ĝin z atentigas, ke tiun monon Asocio povus redoni nur post jaroj, post disvendo de la vortaro. Friedrich (Brno) proponas prokrasti la aferon de granda vortaro. Vítek samopinias. Tamen, se iu profesia eldonisto estus preta ĝin eldoni, ni akceptos tion. Slavík: Sed tiam ni devos lin atentigi, ke la disvendo daŭros jarojn.

Eldoneja kapitalo. Por eldono de la granda vortaro kolektiĝis cca 25.000 Kĉs. La kunveno rekomendas uzi tiun monon por eldono de libraj tradukoj el la ĉeĥa literaturo kun permeso de la pruntintoj. Oni redonos la monon al tiu, kiu ne konsentos kun tiu ĉi uzo.

Ŝanĝo de la asocia statuto. Dum la regiona kunveno en Pardubice s-o Jandík proponis ŝanĝojn en tiu senco, ke la regionaj perantoj estu membroj de la komitato, kaj ke la regionoj estu aŭtonomaj, ankaŭ finance. Sole unu plia peranto konsentis, sed poste revokis

la konsenton, du aliaj proponis alian ŝanĝon de la statuto. Kavan (Plzeň) proponis, ke asocio havu ankaŭ „registritajn membrojn“ sen la gazeto, kun malgranda kotizo. Ing. Krajč (Tábor) proponis, ke asocio organizu nur klubojn, ne izolulojn, kaj ke dum la labora parto de nia kongreso rajtu partopreni sole reprezentantoj de la kluboj, regionaj kaj landaj perantoj.

Friedrich (Brno) atentigas pri temporaba laboro pri ŝanĝo de l'asocia statuto antaŭ la milito; li rekomendas ne malŝpari la tempon kaj fortojn pro negravaj ŝanĝoj. Eĉ se la statuto ne estas tute perfekta, la bori laŭ ĝi oni povas. — Jam nun la regionaj perantoj estas informataj pri la komitataj kunvenoj kaj rajtas ilin partopreni. — Li opinias, ke 1000 veraj agemaj membroj pli valoras ol 10.000 membroj, signifantaj nenion morale nek finance. Dr. Pumpl (Praha) prezentas juran analizon kaj atentigas pri la konsekvencoj de l'aranĝo, laŭ kiu la regionoj estus juraj personoj. Li kontraŭstaras la proponon de ing. Krajč, ĉar en nia movado ĉiu membro havu rajton paroli kaj decidi ĉe la kongreso. Vítek: Ŝanĝo de la statuto ne estas tiom grava, kiom la fakto, ke la centro nun bone laboras. Kavan konsentas prokrasti ĉiun ŝanĝon. La kunveno aprobas unuanime la prokraston.

Prof. Vlado Jukl (Bratislava) salutas en la nomo de la Slovaka Esperanto-Societo kaj detale informas pri ĝia nuna agema administra centro en Turčianský Sv. Martin. Fino de la kunsido je la 14a horo.

LINGVO

Jarosl. Mařík: Armea terminaro ĉeĥa-esperanta

Ni redonas tie ĉi Armean terminaron de E. D. Durant, aperintan en IEL-jarlibro, dua parto, 1940, kun ĉeĥaj tradukoj laŭ oficiala ĉeĥoslovaka terminaro. Estis ellasitaj terminoj ĝenerale konataj, kelkaj terminoj, kiuj ne estas en la originalo difinitaj sufiĉe precize kaj tiuj, kiuj aperas sole ĉe armiloj de britaj tipoj. La terminoj, proponitaj de s-o Durant, ŝajnas al ni tre respondaj al la praktiko kaj al la lingva uzo. Dubojn ni havas sole pri „blokhaŭso“, ĝia difino ne tro respondas al la origina signifo de la germana vorto. La terminoj signitaj per asterisko (*) estas novaj radikoj, proponitaj de Durant. La listo estas kompletigita per kelkaj novaj vortoj. (P) signifas aŭtorecon de Dr. T. Pumpr.

I. Obecná část.

biret bereto*
brannost defendo-povo, -volo
Svaz brannosti Unuiĝo (Unio) de ekster-milita(-soldata) armilservo (P)
(vy)cviĉiti trejni*
cviĉiŝte ekzerca korto, -placo
polní ĉepice falĉapo
vycházková ĉepice (se ŝtitekem) kepo
ŝtítek viziero
četa (org. část roty) plotono*
dávka (stravni) porcio
defilovati defili, preterparadi, parade marŝi
ozbrojený doprovod eskorto
chrániti ozbr. doprovodem, eskortovati eskorti
drobná válka gerila milito
družstvo (část čety) sekcio
puškový granátomet ĝrenadjetilo
heslo pasvorto
průzkumná hlídka skolta patrolo
houkatí na sirénu sireni
odhoukatí poplach, sireni sendanĝerecon
jáma (díra) granátová obus-kavo (-truo)
jednotka trupunuo
jmenovati (do hodnosti) promocii
khaki (barva) kakia
kolisavý tón sirény fluktua sirensono
krýti s boku jednotku flanki trupon
křídlo (bočný útvar; letadla) alo
polní (převozná) kuchyně kuira ĉaro
polní kukátko binoklo
lemovka galono
pevnostní linie fortikaĵa linio
mateřská loď letadlová aviadilporta ŝipo
mina (pozemní, vodní) mino
minomet bombkanono
jídelní miska ĝamelo
mošna kromsako
oddíl (jednotka) trupo
oddíl (část pluků různých zbraní) taĉmento
osvětlovací raketa lumraketo
odvésti rekrutiĝi
padák paraŝuto, falsirmilo
palba dělostřelecká kanon-ado, -bombard(ad)o
služební pás (lid. „dohoda“) balteo
pátrač skolto
plamenomet flamjetilo
slavnostní pochod parada marŝo, defil(ad)o
pochodovati při přehlídce paradi (v. defilovati)
pochodovati volným krokem marŝi sentakte
pochodový proud (marš)kolono
ponton pontono
posíční válka pozicia milito
postavení pozicio
postupovati (terénem) avanci*
prozkoumatí, provéztí průzkum skolti
průrazná střela kiraspika kuglo
předvojenská výchova antaŭsoldatiĝa eduko (P)
přehlídka revuo
přehrada balonová (ochran. balony) balon-barilo, -baraĵo
puma bombo
— zápalná bruliga (incendia)
— časovací fuzea
— plynová gas-

— průrazná kiraspika
rekvírovati rekvizi*
rozčleniti, rozvinouti (do sledů) deploji*
sběhnouti dizerti
sbor armádní (několik divisi) armea korpuso
sled linio
palba bočná (do zákopů) enfil(ad)o
palebný sled paflinio
služba deĵoro; (v širším smyslu) serv-o, -ado
— protiplynová kontraŭgasa servo
— pozorovatelská observa
— zdravotnická sanitara
— strážní (hlídková) sentinela
součinnost (mezi zbraněmi) kooper(ad)o
spojka kuriero
stáhnouti se (v pořádku) retiriĝi
stanoviště posteno
státi, býti na stanovišti posteni
postaviti (muže) na stanoviště postenigi
přední, předsunuté stanoviště antaŭposteno
postavení předních stráží, přední stráže antaŭposteno
garda
pásmo pozorovací předních stráží antaŭposteno observa
polní stejnokroj batala uniformo
vycházkový stejnokroj parada uniformo
stráž(ný oddíl) (malá jednotka) pikedo
— větší, též garda gvardio
strážní budka postena budo, sentinela budo
státi na stráží gardostari
strážný (osoba) sentinelo,* gardostaranto
místo obchůzky strážného sentinela paŝejo
řetěz stráží kordono
střela (v širším smyslu) pafajo
— (v užším smyslu) kugl(eg)lo
— svítící flamkuglo
střelec pafisto; fusilisto
styk interkontakt(ad)o (P)
styk a spojení kontaktado kaj servo de komunikiloj (P)
stýčný důstojník porkontakta oficiro (P)
svah před palebním sledem glaciso
světlomet lumjetilo
tábořiti (pod stany) tend(ar)ji; (bez stanů) bivaki
utábořiti se halti tendare; ekbivaki
torba paksako, tornistro
tvář; útočiti v rozčleněném (semknutém) tvaru ataki en disa (densa) ordo
nbytovatel furiero
úderný oddíl sturmtrupo
ukázněnost disciplinemo [densa
útvár formacio; bojový batala; rozčleněný disa; semknutý
velitel (nejčastěji) estro: sekciestro, rotestro; komandanto
voj (obecně) trupo, armeparto
předvoj antaŭgardio (avangardo)
zadní voj postgardio (ariergardo)
bočný voj flanko gvardio
vrhati pumy bombi; bombardovati bombardi
vyhlásiti stav obležení deklarati sieĝan staton
vykliditi evakui (teritorion)
výzbroj armilaro
zaminovati (pod-) mimi
zastírati kamuflí*
zatemniti nigrumi
zaujmouti stanoviště ekposteni, posteniĝi
závodčí sentinelestro
zbraň střelná paf(arm)ilo; sečná hakbat(al)ilo
země nikoho nenieslando
zteč sturm(ad)o; útočiti zteči („na bodák“) sturmi

II. Část speciální.

granát (ruční) ĝrenado; (dělostřelecký) obuso
iniciátor (kombin. rozbuška) iniciatilo
pojistka sekureca stifto
pojistný klíč sekureca helico
pouzdro na trhavinu eksplodaĵa ujo
roznětka prajmo
rozbuška eksplodigilo; eksplodiga prajm(a)jo
tělo šelo
trhavá náplň eksplodaĵo
úderka frapilo

zaoblený (dělostřelecký granát) ogiva
zapalovač, zapalovací zařízení fuzeo
— nárazový frapíuzeo
— časový tempfuzeo

k u l o m e t („lehký“) (angl. typ čs. původu) brenpafilo
(„bren“ je zkratka z „Brno“ a zač. písm. angl. města)

pažbička firmtenilo
podstavec stativo; starilo
předsuvná tyčinka resalta stango
předsuvná zpruha resalta risorto
rukojeť hlavně movebla anso
žlábek pro vodičko podavače kartočaj gvidkaneloj
vyhazovač eljeta kliko
zásobník magazeno
závorník kulasbloko
nábojový pás (u těž. kul.) kartoča rubando, r. da kartočoj

Společné výrazy pro kulomet i pušku:

botka šuo
hlaveň paftubo
nábojní komora kulaso
mířidla celkalkuliloj:
muška antaŭa (buša) celilo
hledí malantaŭa (kolba) celilo
řemen portrimeno
spoušť ellasilo
lučičk spušťadla ellasila ponto
spoušťová páka vekto
úderník čano
úderníková zpruha čana risorto
zasunutý náboj pafota kartočo
zápalník čanpinto, frapilo
závit hlavně (rýha) paftuba kanelo

l e t e c t v í aviado

letectvo aviadistaro; (zbraň) aviad-, aer-, flug-armeo
letiště aviadejo, aerodromo
přistávací plocha flugkampo
